

Leterkesto

Claude Gacond, 263-a radioprelego, 1968.10.23 & 26

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Jam de longe ni ne plu respondis al niaj korespondantoj. La poŝtkartoj kaj leteroj amasiĝis en nia leterujo. Ni hodiaŭ ĉerpos ilin iom hazarde, por povi babili kun vi kaj saluti la geaŭdantojn, kiuj de tempo al tempo donas vivsignon pri sia ekzisto.

A.- Sinjoro Henri Coulon en Montbéliard, Francio, ŝatis reaŭdi la prelegojn de Charles Ecabert pri Pestalozzi kaj donas novaĵojn pri esperanto-kurso, kiu bone sukcesas.

Cl.- El la sama lando skribis Gaston Vidal en Chemalières. Li diras : « *Via parolado pri la libro de Edmond Privat, kiun mi legis, mi bone kaptis kaj mi decidis vin danki per poŝtkarto pro via sindonemo al Paclaboro. Ankaŭ al Radio-Bern kompreneble mi dankas.* » Sinjoro Vidal bedaŭras, ke la esperantistoj laboras en diversaj organizaĵoj. Li pensas, ke tiu divido malhelpas efikan laboron. Mi ne partoprenas tiun vidpunkton. Mi pensas, ke ĝuste tiu diseco estas la forto de la esperantismo. La unueco estas ĉiam danĝera. Se ni estus fondintaj unu solan vastan hierarkian movadon, de longe la estraro estus en la manoj de profitemuloj. Povas esti, ke unueco profitus al la esperantismo, sed nur dum momento. Poste ĝi malhelpus la progresojn. Sed kio estas al ni necesa, tio estas kunlabori en federacioj, kaj ĉiam respekti la ekzistadon de konkurencaj societoj.

A.- Por resti en Francio ni salutas sinjoron Lucien Giloteaux en Croix. Aŭskultante elsendon de Radio-Budapeŝto li aŭdis nian voĉon en intervjuo farita dum la kongreso en Kecskemèt, kiun ni partoprenis en julio. Li anoncas la eldonon de ilustrita broŝuro, kiu rakontas la historion de la fondo de la kulturdomo en Grésillon.

Cl.- Alia aŭdanto skribis pri la intervjuo de Radio-Budapeŝto. Ni salutu lin : sinjoro Walter Kaukaj en Neustadt-Weinstrasse, Okcidenta Germanio. Ni citu lin: « *Kia surprizo. Mi povis kaj povas aŭdi la voĉon de sinjoro Gacond ne nur kiel antaŭ-parolanto de ĉiu esperanto-elsendo de Radio-Svislando, kaj kiel preleganto ĉiun merkredon, sed mi povis aŭdi la voĉon de sinjoro Gacond ankaŭ sabate, jes, sabaton ! sed kia surprizo – ne el Svislando, sed en la intervjuo ĉe Radio-Budapeŝto ! Ĉu vi parolos iam pri la Esperanto-kontaktoj Svislando-Hungarujo, aŭ pri via vizito ĉe radio Budapeŝto, aŭ pri la mirinda disvastiĝo de la Internacia Lingvo en Hungarujo aŭ pri impresoj el Kecskemèt ?* »

A.- Kontaktinte nian koleginon de Radio-Budapeŝto ni havis la esperon organizi foje komunan kulturan elsendon. Sed la eventoj de aŭgusto, kiu vidis hungarajn soldatojn partopreni la perfortan invadon de Ĉeĥoslovakio nin senkuraĝigis oficiale kunlabori jam nun kun Radio-Budapeŝto. Oni nin bone komprenu. La esperantistoj persone devas favori la internaciajn kontaktojn. Sed kiam ili havas oficialan funkcion, estas normale, ke ili bone pripensu siajn agadojn. Svislando estas lando neŭtrala, kiu estas ĵaluza pro sia sendependeco. Kiam sviso vidas alian malgrandan landon, kiu estas perforte atakata de grandega najbaro, li ne povas ne sin meti en la korpon de la perfortito. Ni hodiaŭ pensas al la ĉeĥoslovakaj samideanoj, kiuj tiom esperis, kaj kiuj nun vidas grandan parton de sia agad- kaj esprim-libereco malaperi pro la interveno de la dirita al ili amika registaro. Nia veturo en Hungario kaj Jugoslavio montris al ni, ke en tiuj du landoj la loĝantaro simpatiis por la reformoj de la ĉeĥoslovaka registaro. Pro tio ni silentos pri nia agrabla restado en tiuj orientaj landoj. Ni nur per la ondoj dankas ĉiujn gesamideanojn, kiuj nin tiel afable gvidis kaj gastigis. Kaj kiam la aferoj ordiĝos, ni eble povos aranĝi kulturajn interradiajn programojn.

Cl.- Tria aŭdanto havis la okazon aŭdi nian intervjuon ĉe Radio-Budapeŝto. Estas sinjoro Eugène Wermelinger en Buhl, Francio.

Leterkesto

Claude Gacond, 263-a radioprelego, 1968.10.23 & 26

A.- El Ĉeĥoslovakio ni ricevis du longajn kaj interesajn leterojn de sinjoro Jiri Patera en Most. Jen interesa ero : « *Mi aŭdis la elsendon sabate la 1-an de junio, kiam vi legis mian leteron. Vi legis ankaŭ mian mencion pri Israelo kaj klarigis la aferon. Ekde la tempo, kiam mi skribis la menciitan leteron al vi, okazis multaj ŝanĝoj en nia lando kaj mi scias nun, kiel malbone mi estis informita pri la afero antaŭe. Mi aŭdis kelkajn programojn tiutemajn en televido, mi legis artikolojn de verkisto Arnoŝt Lustig, mi legis intervuojn kun sekretarioj de la komunistaj partioj en Israelo kaj mi vidas nun, ke la afero tute ne estas tiel simpla kaj unuflanka, kiel ĝi estis prezentata al ni pli frue. Mi estas konvinkita, ke nia registaro faris ne bone rompinte la diplomaciajn rilatojn kun Israelo kaj apogante la arabajn ŝtatojn. Mi opinias, ke pli bona sinteno estus la neŭtrala kunstrebo al subteno de la paco en tiu teritorio kaj en la tuta mondo. »*

Cl.- Estas interese legi tiujn liniojn, kaj ni pensas, ke la devo de la esperantistoj estas provi sin emancipadi de la naciaj influoj. Kiam konflikto disigas la homojn, ni ĉiam devas provi kompreni ambaŭ vidpunktojn kaj plej laŭte esprimi trian vidpunkton, tiun de la homaranismo, de la homo vidata kiel ano de la homaro, kaj ne nur kiel ano de unu nacio.

A.- El Usono venis du leteroj de sinjoro Conrad Fisher en Meaville, Pensilvanio. Li deziras uzi niajn prelegojn pri la historio de la esperanto-movado profite al la instruado de nia kulturo. Ni ripetas al niaj geaŭdantoj, ke niajn kulturajn prelegojn ni sendas poste al la gazeto *Sennaciulo*, kaj ni donas al ĉiuj la rajton uzi tiujn prelegojn kaj tekstojn por diskonigi al la esperantistoj ilian propran kulturon. Sed ni ŝatas esti informataj pri la uzo, kiu estas farata de niaj registritaj radio-prelegoj kaj de niaj artikoloj. Do estas ĉiam tre ĝojige, ke ni ricevas informojn pri reaŭdado en grup-kunvenoj kaj relegado en vesperaj kursoj.

Cl.- Ni revenu al Eŭropo. Skribis sinjoro Joakimo Mallach en Barcelona, Hispanio. Li sendis informojn pri la temo esperantologio.

A.- Sinjoro Harold Taylor en Newcastle upon Tyne, Britio, informas, ke la esperanto-klubo en Newcastle upon Tyne festis sian 50-an datrevenon. Tiuokaze estis uzata en la poŝtoŝtampo speciala stampilo. La filatelistoj povas akiri kovertojn kun tiu poŝtstampo. Ili do skribu al la Esperanto-Grupo en Newcastle upon Tyne, Britio.

Cl.- El Britio salutis ankaŭ la familio Najbaro en Keighley. Tiu familio ŝatis aŭdi legi erojn el la esperanta literaturo. Ni citas : « *Ni ĉiuj dankas al vi ambaŭ por la serĉado kaj tiel bona recitado de la literaturaj juveloj de nia lingvo. Ĉielo, se iu aŭdus vin sen la enkonduko de la **Ebriulo** oni certe povus pensi, ke vi ebriiĝis. »*

A.- La minutoj rapidas. La momento adiaŭi alvenis. Bedaŭrinde kuŝas en nia leterujo ankoraŭ kelkaj salutoj. Ni respondos al ili dum venonta elsendo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-